

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 4-a parto
Claude Gacond, 268-a radioprelego, 1968.11.27 & 30

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Kiel ni promesis la pasintan semajnon, ni daŭrigas la rakonton pri la restado de Gandhi en Svislando. Ni ĉerpas kaj tradukas el la tagĵurnalo de Romain Rolland, en kies vilao la hinda Mahatma restadis dum kelkaj tagoj en decembro 1931.

A.- Ni hodiaŭ tradukas parton de la dua interparolado okazinta la mardon 8-an de decembro 1931. En tiu diskuto Gandhi unue deziras babili pri sia reveno tra Italio. Lin invitis la konsulo Scarpa, sed li malfidas tiun faŝistan funkciulon. Li pensas, ke Scarpa kaj la itala registaro deziras uzi lian trapason en Italio por propagandaj celoj, kiel ili faris kun la hinda verkisto Tagore. Tamen Gandhi volonte renkontus Mussolini, por povi antaŭ li publike esprimi sian naŭzon pri la faŝismo. Sed li deziras eviti tion, kio povus permesi misuzon de lia populareco. Jen laŭ la notoj de Marie, la sekretariino de Romain Rolland, resumon de tiu diskuto. Nun estas Gandhi, kiu parolas :

Cl.- « *Mi ŝatus iri tien por vidi Mussolini. Mia deziro estas vidi homojn, alporti al ili mesaĝon pri paco. Ke ili ĝin ne akceptas, tio estas al mi egala ; tio ne povas igi min ŝanĝi mian vojon. Kaj mi deziras vidi la papon, kiu sendis al mi afablan vorton ; se mi lin renkontos, mi poste povos pli bone rilati kun la romkatolikaj hindoj ; kaj mi renkontos ilian estron, kiel mi renkontas la estrojn de la muzulmanoj. Mi renkontis katolikajn episkopojn, protestantajn estrojn kaj muzulmanajn gvidantojn. Mi scias, ke inter ili unuj estas malicaj ; sed aliaj estas bonaj. Ĝis nun mi forgesis Italion ; sed Scarpa min ne forgesis, kaj jen lia lasta letero. Por mia enŝipiĝo en la itala haveno, la Lloyd Office prokrastus la forveturon ĝis la mezo de la tago, tio laŭ ili permesus al mi veturi al Brindisi. Sed mi ne volas komplezon. Scarpa ankaŭ proponas al mi du unuaklasajn budojn ekde la itala landlimo. Mi deziris veturi triaklase. Sed mi ne volas disputi pri tio. Scarpa petas informojn pri la dato de mia alveno ĉe la landlimo. Li skribas, ke la tempo, kiun mi antaŭvidis por Italio estas tro mallonga por la de li pretigita programo. Li asertas al mi, ke tiu gastiga invito estas privata, ne oficiala, kaj ke la invito venas de li. Sed tio estas nura formo : la itala registaro troviĝas malantaŭ tio. Scarpa estas ĝia ilo. Sed troviĝos en Milano kaj Roma homoj, kiuj deziras min renkonti. Scarpa ŝatus, ke mi alvenu en Milano la naŭan de decembro. »*

A.- Tio signifas la morgaŭon de tiu interparolo kun Romain Rolland. Gandhi daŭrigas :

Cl.- « *En Roma la 11-an, kaj ke mi forveturus la 13-an. Sed mi ne volas mallongigi mian restadon ĉi tie ; mi donos al Italio nur unu tagon. Sinjorino Toeplitz, edzino de la direktoro de la Banko de Italio deziras min gastigi. En Roma la **Instituto di cultura** prezidata de Gentile aranĝus akceptadon. La grafino Carnevadi min gastigus. Oni petas, ke mi esprimu miajn dezirojn pri la vizitado de institucioj telegrafante miajn planojn. Mia persona deziro estas restadi nur unu tagon en Roma ; mi intencas partopreni nenian publikan akceptadon. Sed tiu Instituto estas bone konata, kaj mi volonte irus tien diri kelkajn vortojn. Kaj se la papo volas min vidi, mi iros. Pri Mussolini mi ne kredas, ke li deziras min vidi ; sed se li deziras, mi ne hezitos, mi ankaŭ iros. Sed ne sekrete. Mi neniun vidas sekrete. Jen mia sinteno. Kaj nun parolu! »*

A.- Tiam responde Romain Rolland raportas pri la situacio en Italio. La forpaso de la jaroj konstatigas lian tiaman klarvidecon. Li mencias, « *ke la filino de la bankisto Toeplitz estas esploristino. Ŝi vizitis Tibeton kaj verkis librojn pri tiu vojaĝo. En tiu ŝia raportaro apologio pri Mussolini najbaras kun tekstoj pri Budho kaj Kristo.* » Romain Rolland raportas pri la filozofio de Gentile, la disĉiplo de Croce. « *Per rafinita sofistikado li provas akordigi la absolutan obeadon al la faŝisma ŝtato kun la plej altaj idealoj.* » Romain Rolland malkonsilas

Mahatma Gandhi en Svislando laŭ Romain Rolland, 4-a parto
Claude Gacond, 268-a radioprelego, 1968.11.27 & 30

al Gandhi kontaktojn kun tiaj homoj. Pri la invito de la **Instituto di Cultura** Gandhi aldonas en respondo al Romain Rolland :

Cl.- « *Mi akceptos la inviton de Scarpa paroli en la Instituto. Sed je la kondiĉo, ke mi povos paroli en ilia ĉeesto pri ĉio ajn, kion mi volos.* »

A.- Romain Rolland respondas.- « *Tiam postulu la ĉeeston de fremdaj raportistoj por la registro de viaj diroj...* »

Cl.- Gandhi rebatas.- « *Estas kontraŭ mia naturo faris antaŭaranĝojn.* »

A.- Romain Rolland aldonas.- « *Oni izoligos vin, oni vin enĉambrigos.* »

Cl.- Gandhi.- « *Mi konscias pri tio, sed tio ne malhelpos min rompi la kordon... Mi metos la kondiĉon povi libere paroli, kaj ne nur neŭtralumi ; mi diros ĉion, kion mi pensas...* »

A.- Romain Rolland.- « *Mi ne kredas, ke oni vin malhelpos paroli ; sed la demando estas la postaj forigoj aŭ deformoj en la gazetaj raportoj...* »

Cl.- Gandhi.- « *Ni supozu, ke miaj diroj ne estos raportataj, ke ili estos deformitaj. Eĉ en Britio tio okazis, escepte en la gazeto **Manchester Guardian** ; aliaj gazetoj simple bojkotis miajn dirojn. Kion mi diris en Parizo, tio estis deformita ; kaj la gazeto **Figaro** skribis hontindaĵojn. Sed **Young India** komplete reproduktas ĉion, kion mi diris kaj diros.* »

A.- Romain Rolland.- « *Sed la malbono kaŭzata de tiuj deformadoj – en Britio kaj Francio – nur celas vin, dum en Italio ili celus la italojn mem. Oni dirus en la publiko : « La granda sanktulo estas kun la premantoj kontraŭ la prematoj. » Alia danĝero : vi parolos angle, oni tradukos italen. Kiu faros la kontrolon ? Oni povos ŝanĝi la sencon de viaj vortoj. Estas necese postuli stenogramon.* »

Cl.- Gandhi.- « *Se mi pensas, ke mia devo estas paroli, tion mi faros, min forlasante al Dio.* »

A.- La tempo estas al ni limigita. Ni raportis tiun interesan debaton, por prezenti unu el la aspektoj de la personeco de Gandhi. Dum la eŭropano Romain Rolland rigardis ĉefe al la nuno, al la malbono, kiu povus esti tuj farita, Mahatma Gandhi vidas la futuron. Li scias, ke la jaroj vidigos, kiu pravis, kiu diris la veron, kaj kiu kaŝis tiun veron. Li eĉ diras en tiu konversacio :

Cl.- « *Iam ago ne tuj efikas, sed ĝia efiko estas fora. La tuja efiko povas esti, ke la gazetaro deformats miajn dirojn ; sed la fora efiko de bona aĵo devas esti bona.* »

A.- La venontan semajnon ni revenos al la restado de Gandhi en Svislando. Vi vidos, ke Gandhi ne kaŝos sian penson, kaj ke pro tio la svisaj aŭtoritatoj estos kontentaj lin vidi forveturi. Vidante tion ankaŭ la itala registaro estos tre kontenta pri la intencoj de la hinda gvidanto restadi nur unu tagon en Roma.

Cl.- Vi aŭdis prelegon el Svislando. Parolis Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !

-oOo-